HAMBURGA ESPERANTO-SOCIETO R.A.

ESPERANTO-VEREIN HAMBURG E.V.

Klaus-Groth-Str. 95
D-2000 Hamburg 26
Tel.: 040-250 30 65

HES INFORMILO

1/88

HES-prezidanto: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, tel.: 435197
HES-konto:Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) konto n-ro 173 22-207

- Klubvesperoj ĵaŭde 20-a horo -
- klubejo malfermita 18-a horo -

JAHRESHAUPTVERSAMMLUNG

Esperanto-Verein Hamburg e.V.

am 25. Februar 1988, um 20^{00} Uhr

im Vereinshaus Klaus-Groth-Str. 95
2000 Hamburg 26

(Tagesordnung auf S. 4)

N I A P R O G R A M O

Januaro 1988

7-a: Raporto pir la Kongreso de Eúropa-Unio (Elsbeth Bormann)

14-a: Ni diskutas pri artikolo el la revuo "El Popola Ĉinio"

21-a: Pri ekologio, akvo kaj rubo prelegas Gerald Roemer

28-a: Ni rigardas diapozitivojn el antaúaj jaroj pri niaj kostumfestoj (Ellen Eggers)



Februaro 1988

4-a: Lingvaj ludoj (Benno Klehr)

11-a: Hella Lanka invitas (rigardu dekstre)

18-a: Klubejo fermita pro sabata festo!

20-a: Kostumfesto, komenco 20-a horo

25-a: J A R Ĉ E F K U N V E N O de H E S

rigardu inviton sur paĝo 4 !



20. Februar 1988
20 Uhr

Wir laden ein zum KOSTÜMFEST im Klub!
Auch wer (noch) kein Esperanto spricht,
oder kein Vereinsmitglied ist,
darf gerne daran teilnehmen.

... aber bitte im Kostüm!

Ni DANKAS al ĉiuj, kiuj helpis kaj kunlaboris en la jaro 1987.

la estraro



I N V I T O


al la JARĈEFKUNVENO 1988
de Hamburga Esperanto-Societo,
la 25-an de februaro 1988, 20^{00} h.


Tagordo

1. jarraporto
2. kasraporto
3. diskuto pri 1. kaj 2.
4. raporto de la revizoroj
5. senŝarĝigo
6. raporto de la konsilantaro
7. buĝeto kaj kotizoj
8. elektoj de estraro kaj konsil.+R
9. diskuto kaj decido pri proponoj
10. diversaĵoj

Atentu ! Proponoj devas atingi la estraron ĝis la 11-a de februaro!

Benno Klehr
prezidanto





Kelkaj el niaj membroj ne facile trovas la vojon ...!

HAMBURGA ESPERANTO-SOCIETO R.A.

ESPERANTO-VEREIN HAMBURG E.V.

HES-INFORMILO

Klaus-Groth-Str. 95
D-2000 Hamburg 26
Tel.: 040-250 30 65

2/88

HES-prezidanto: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, tel.: 435197
HES-konto: Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) konto n-ro 173 22-207

Ni deziras ĝojan paskon al ĉiuj membroj kaj amikoj!

Jarĉefkunveno 1988

Ĉi-jare denove estis denove elektoj de la estraro.
La estraro de HES ekde 25-02-88:
Prez.: Benno Klehr, Vicprez.: Dr. Vesna Staničić-Burchards, Sekr.: Heinrich Wielgus, Kaso: Hella Lanka, Estrarano pri ĵaŭdoj: Beate Jagota.
La jarĉefkunveno, la plej grava kunveno de la jaro ankaŭ ĉi-jare estis vizitata nur de tre malmultaj membroj. Ŝajnas, ke multaj membroj estas tro inertaj eĉ por klopodi partopreni en la kluba vivo.
La jarĉefkunveno donas la direktivojn por la agado, sed ŝajne al "simplaj membroj" sufiĉas, atendi ke la estraro ion faru. Proponoj de membroj ne venis.

Benno Klehr

Novaĵoj el la HES-klubejo

En la teretaĝo de la klubejo la 1-an de marto ekfunkciis la Oficejo pri Eŭropa Interkompreniĝo (Büro Europaverständigung), kiun instalis la Societo pri Internacia Lingvo (Gesellschaft für Internationale Sprache e.V.). En tiu oficejo laboras 4 dungitoj en t.n. ABM. (Arbeitsbeschaffungs-Maßnahme = ŝtata aranĝo por senlaboruloj) La celo de la laboro estu plibonigo de internaciaj kontaktoj helpe de Esperanto.
GIS luis de HES la teretaĝon de la klubejo. La kluba vivo nun okazas en la suba etaĝo. Do necesis translokigi la kuirejon kaj ĉion, kion ni bezonas dum klubvesperoj. La supra salono ne povas esti samtempe serioza oficejo kaj komforta klubejo. Tamen kursoj ankaŭ estonte povos okazi en la supra salono.
Tiu oficejo unuafoje ebligas profesian laboron por Esperanto en Hamburg. Pro tio la estraro decidis, ŝanĝi la klubejon. La oficejo estas bonega ŝanco por la progreso de Esperanto. Ĉiukaze ni devas adapti nian klubon al la interesoj de tiuj homoj, kiujn ni deziras konvinki pri la avantaĝoj de Esperanto. La novan generacion ni ne povas allogi per komforta ejo kvazaŭ gastejo, ni fakte eĉ forpelas iujn, kiuj vere interesiĝas pri Esperanto. Oficejo en la teretaĝo tuj donas impreson de serioza afero. Ni scias, ke Esperanto estas serioza afero, sed novuloj ne.

Nia Programo

Marto 1988

31-a: "ovo-kunveno"

Aprilo 1988

7-a: Lingvaj ludoj

14-a: Humuraj Tekstoj

21-a: diapozitivoj pri Stralsund (s-ro Jenzen)

28-a: Inaŭguro de la nova salono

Majo 1988

5-a: Eŭropa Tago

12-a: "ĉe-Ellen-ir-tago"; 15°° h ĉe Ellen Eggers,
Minsbekkehre 4, Hamburg-Poppenbüttel:
Kafo kaj kuko en la ĝardeno

Ankoraŭ ne ĉiuj membroj pagis siajn kotizojn por 1988
La sumaj kotizoj por HES kaj GEA estas:
minimume:....................................DM 65,--
ordinara membro:.............................DM 85,--
subtenanto de GEA:............. (minimume) DM 135,--

Was ist denn im Klub los?

- Donnerstag kein Programm, Kostümfest fällt aus, Intensivkurs fällt aus und keiner weiß bescheid ...

Es kam für uns alle überraschend: Das Büro Europaverständigung wollte schon am 1. März mit seiner Arbeit beginnen (s. novaĵoj el la klubejo). Dafür muß der obere Raum des Klubhauses auch wie ein Büro aussehen. Wir mußten also den Klubraum und die Küche nach unten verlegen. Das bedeutete viel Arbeit, und das ganze Haus stand auf dem Kopf. Mitten im Umzug hatten wir keinen Platz und keine Zeit für Veranstaltungen. Nur die Jahreshauptversammlung fand wie geplant statt, wat mutt, dat mutt.
Am Wochenende nach der Versammlung ging dann die "große Wühlerei" los, denn am Montag mußte das Büro oben fertig sein. Diese Veränderungen im Klubhaus lösten bei einigen Mitgliedern etwas Unbehagen aus. Sie fürchten dadurch ihren schönen, gemütlichen Klub zu verlieren. Wir versprechen: Es wird im neuen Klubraum auch sehr gemütlich, vor allem viel ruhiger, ohne Lärm aus der Küche, denn die ist in einem geschlossenen Nebenraum. Der obere Raum als Büro und Unterrichtsraum entspricht eher der satzungsgemäßen Aufgabe des Vereins: Verbreitung des Esperanto. Das Vereinsleben darf nicht zum Selbstzweck werden.

HAMBURGA ESPERANTO-SOCIETO R.A.


ESPERANTO-VEREIN HAMBURG E.V.

HES-INFORMILO

3/88

Klaus-Groth-Str. 95
D-2000 Hamburg 26
Tel.: 040 - 250 30 65

HES-prezidanto: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, tel.: 435197
HES-konto: Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) konto n-ro 173 22 - 207



Antaŭ 100 jaroj okazis la solena inaŭguro de la "Speicherstadt", var-deponeja kvartalo en la tiam nova libera haveno de Hamburg.

N I A P R O G R A M O

majo 1988

26-a: Germana Esperanto-Kongreso 1988

junio 1988

2-a: K-H. Hoffmann: "Junuloj kaj edukado" - (sonbendo de svisa radio)

9-a: "N I K A N T A S"
(konataj kaj nekonataj kantoj por ĉiuj)

16-a: E. Wielgus legas el la verkaro de Kiŝon.

23-a: "Enigma Vespero"

30-a: Ni legas el niaj gazetoj
(Bonvolu kunporti interesajn artikolojn!)

julio 1988

7-a:)
14-a:)
21-a:) somera paŭzo - gastoj estas bonvenaj programo laŭ okazo
28-a:)

aŭgusto 1988

4-a: s-so Pleadin el jugoslavio prezentas diapozitivojn .

100-jara "Speicherstadt"

La var-deponeja kvartalo de la hamburga haveno estis inaŭgurita en 1888. Ĝi troviĝas ĉe la suda rando de la malnova urbocentro, 200 metroj de la iama katedralo. Por konstrui la deponejojn, oni translo ĝigis 24.000 homojn, kiuj antaŭe vivis tie. La brikaj domoj en la stilo de la epoko, kun gotikaj arkoj, barokaj turetoj el kupro kaj renesancaj gabloj, estas unikaj en Eŭropo.

* *

unununununununununununununununununununununununununu

* *

A T E N T O N !

Kelkaj membroj ankoraŭ ne pagis la kompletajn kotizojn por la jaro 1988.
Bonvolu tre baldaŭ ĝiri al nia poŝt-ĝiro-konto:
n-ro 173 22 - 207 (BLZ 200 100 20)

Hella Lanka
kasistino

...cetere, ni jam nun aĉetis oleon por la vintra hejtado, por ŝpari per la momente favora prezo.

"Ĉe-Ellen-ir-tago" 1988

La Ĉe-Ellen-ir-tago fondiĝis antaŭ multaj jaroj, post rondirado ĉirkaŭ la Alster, kiam ni kunvenis ĉe Ellen en la Sierichstraße. La rivero Alster kun siaj migradvojoj ĉiam estis parto de la ĉielir-tago. Ellen nun loĝas en Poppenbüttel. Escepte de ĉi tiu jaro, ni migradis de S-stacio Wellingsbüttel tra la valo de la Alster al la hejmo de Ellen. La kunveno ĉi-jare estis vizitita de multaj amikoj, kiuj sidis ĉirkaŭ du grandaj tabloj, trinkis kafon kaj manĝis kukon. Feliĉe la vetero estis bonega, kaj la plimulto sidis en la ĝardeno, ĉirkaŭita de multkoloraj floroj. Viglan konversacion kaj ĝojan ridadon oni povis aŭdi. Kelkaj gastoj foje malaperis en la kuirejo por trinki brandon. La bele aranĝita loĝejo de Ellen enhavas multajn objektojn el Ĉinujo, kie ŝi vivis dum parto de sia junaĝo. Je la fino de la festo estis skribita komuna letero al Rüdiger Sachs, kiu momente estas en Afriko. Ĉiuj sendis salutojn, sed estis surprizige, ke parto de la esperantistoj skribis en germana kaj ne en esperanta lingvo.Je la sepa ĉiuj foriris, la festo finiĝis. Bonŝance por Ellen kelkaj gastoj helpis al ŝi, ordigi la loĝejon. Ĉiuj danku al Ellen pro ŝiaj afableco kaj ĝentileco.

(Verkita dum semajnfina kurso)
de Delia, Käthe kaj Walter.

HAMBURGA ESPERANTO-SOCIETO R.A.

ESPERANTO-VEREIN HAMBURG E.V.

HES

Klaus-Groth-Str. 95
D-2000 Hamburg 26
Tel.: 040-250 30 65

INFORMILO 3/88 A

HES-prezidanto: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, tel.: 435197
HES-konto: Postgiro Hamburg (BLZ 200 100 20) konto n-ro 173 22-207

10 Jahre Esperanto-Haus

Klaus-Groth-Str. 95, 2000 Hamburg26

1. September 1988, 18⁰⁰ Uhr

E I N L A D U N G

zum

I N F O R M A T I O N S A B E N D

ESPERANTO
ESPERANT

Esperanto-domo 10-jara

En la komenco estis la "Briko-Kaso". Tiu fonduso por aĉeto de klubejo estis fondita en 1962. Komence de la 70-aj jaroj ekestis planoj pri esperanta renkontiĝejo en norda germanio. La projekto, por kiu jam domo estis trovita, ne efektiviĝis. En 1977 Hamburga Esperanto-Societo luis klubejon, kaj tiel ne plu devis renkontiĝi en gastejoj. En 1978 HES povis aĉeti domon, helpe de Briko-Kaso, donacoj kaj kredito. La aktivaj membroj mem konstruis klubejon en la iama lavejo. En majo 1979 estis la inaŭguro. Poste preskaŭ ĉiuj klubaj aranĝoj okazis ĉi tie. Krome junularaj renkontiĝoj, teatraj vesperoj kaj aranĝoj de aliaj kluboj. Kompreneble en la domo ankaŭ okazis Esperanto-kursoj. 1982 Germana Esperanto-junularo translokigis oficejon kaj presejon al Hamburg. Sub la nomo HAPS la adreso fariĝis internacie konata. En 1986 GEJ forlasis Hamburgon kaj la antaŭa presejo estis nove ekipita por la kluba biblioteko kaj salono por povi samtempe instrui du kursojn. Sed jam en 1988 denove ĉio ŝanĝiĝis: La kuirejo estis instalita en la suba etaĝo, la biblioteko en la teretaĝo, kie ek de marto laboras "Büro Europaverständigung" (oficejo por eŭropa interkompreniĝo). La celo de ĝi estas, intensigi la kontaktojn inter la civitanoj de Eŭropo, uzante kaj subtenante Esperanton.

Neue K U R S E

Anfänger: Donnerstags 18³⁰ - 20⁰⁰ Uhr; Beginn 08.09.88

Fortgeschrittene: am Wochenende, im Drei-Wochen-Rhythmus

Beginn: Oktober 1988

N I A   P R O G R A M O

Aúgusto 1988

4-a:	Diapozitivoj pri Jugoslavio de s-ro Pleadin
11-a:	Vojaĝ- kaj kongres-raportoj
18-a:	Kongres- kaj vojaĝ-raportoj
25-a:	Ni rigardas diapozitivojn el Rotterdam

Septembro 1988

1-a: Esperanto-domo 10-jara

18.00 h   I N F O R M V E S P E R O

HES kaj Büro Europaverständigung invitas:

20.00 h   Diskuto kun Ulrich Lins:
Pri historio de Esperanto kaj aspektoj por la estonteco

8-a: 18.30 h   N O V A   K U R S O
20.00 h   Prelego pri Bahaa Religio

15-a: K-H. Hoffmann prezentas elsendaĵon de Svisa Radio Internacia.

22-a: Ni lude lernas el PIV.

29-a: Babilanta Rondo

10 Jahre Esperanto-Haus

Am Anfang stand die "Briko-Kaso" (Ziegel-Kasse). Der 1962 gegründete Vereinshaus-Fonds sollte Stein für Stein den Kauf eines eigenen Hauses ermöglichen. Anfang der 70er Jahre entstand die Idee eines Esperanto-Tagungszentrums in Norddeutschland. Das Projekt, für das sogar schon ein Haus gefunden war, konnte nicht verwirklicht werden. 1977 zog der Esperanto-Verein Hamburg in gemietete Räume und war damit nicht mehr auf Gaststätten angewiesen.
1978 konnte der Verein mit Briko-Kaso, Spenden und Kredit das Haus in der Klaus-Groth-Straße kaufen. Größtenteils durch Eigenleistung der Mitglieder wurde die ehemalige Wäscherei zum Vereinshaus umgebaut. Im Mai 1979 wurde das Haus eröffnet. Seitdem fanden fast alle Vereinsveranstaltungen hier statt. Außerdem fanden Jugendtreffen, Theaterabende, und Veranstaltungen anderer Vereine statt. Natürlich wurde das Haus auch für Esperanto-Kurse genutzt. 1982 verlegte die Deutsche Esperanto-Jugend ihr Büro und die Druckerei nach Hamburg. Das Esperanto-Haus wurde als HAPS-Büro eine international bekannte Adresse. 1986 zog die DEJ von Hamburg Richtung Bonn, wo das Deutsche Esperanto-Zentrum aufgebaut wurde. Danach konnte die ehemalige Druckerei zu einem Unterrichtsraum und einem Raum für die Bibliothek umgebaut werden. Dadurch wurde es möglich, z.B. zwei Kurse gleichzeitig stattfinden zu lassen. Doch schon 1988 wurde wieder umgebaut: Die Küche wanderte ins Untergeschoß, die Bibliothek zog ins Erdgeschoß, wo im März das Büro Europaverständigung seine Arbeit aufnahm. Ziel dieses Büros ist es, das in Sonntagsreden immer wieder beschworene "Europa der Bürger" mit Leben zu erfüllen und dabei Esperanto und die Verbindungen der Esperanto-Bewegung zu nutzen und zu fördern.
Aller Unkenrufe zum Trotz, das Haus könne keine zwei Jahre überleben, sind es inzwischen zehn!

Titelbildgestaltung: Hella Lanka

10 Jahre Esperanto-Haus


Esperanto-Verein Hamburg e.V. von 1904

Klaus-Groth-Str. 95, 2000 Hamburg 26
Tel. 250 30 65

1. September 1988, 18°° Uhr

INFORMATIONSABEND

Klaus-Groth-Str. 95,
2000 Hamburg26



Esperanto - mehr als nur eine Sprache

Da Esperanto nicht an ein bestimmtes Land gebunden ist, kann man überall auf der Welt Menschen treffen, die Esperanto sprechen, und durch sie kann man andere Länder besser kennenlernen, da man Informationen aus erster Hand erhält. Auch wenn man nicht ins Ausland reisen kann, hat man mit Esperanto die Möglichkeit, Menschen aus anderen Ländern zu treffen.
In der Bundesrepublik findet jährlich zur Jahreswende das "Internationale Seminar" der Deutschen Esperanto-Jugend statt. Gleichzeitig wird für die etwas älteren das "Internationale Festival" angeboten. Beide Veranstaltungen bieten ein reichhaltiges Programm mit Vorträgen, Arbeitsgruppen und Unterhaltung, das auf die Altersgruppen abgestimmt ist.
Schon häufig haben Teilnehmer der im September beginnenden Kurse bereits zum Jahresende ihre Sprachkenntnisse erfolgreich anwenden können.
Kaum zu glauben?
Tatsächlich kann man Esperanto so schnell lernen!
Das unterscheidet Esperanto eben von allen anderen Sprachen, neben seinen vielen praktischen Anwendungsmöglichkeiten und seiner Neutralität.
Esperanto bietet einfach mehr!

Ü B E R Z E U G E N S I E S I C H S E L B S T !

10 Jahre Esperanto-Haus

P R O G R A M M

E S P E R A N T O   V E R E I N   H A M B U R G   e.V.

Klaus-Groth-Str. 95, 2000 Hamburg 26 (UBahn Burgstraße)

INFORMATIONSABEND

1. September 1988, 18.00 Uhr,

18.00 Uhr	Eröffnung der Ausstellung
19.00 Uhr	Esperanto-Probelektion
20.00 Uhr	Diskussion über Vergangenheit und Zukunft der Internationalen Sprache Esperanto

Von 18.00 bis 22.00 Uhr bieten wir Informationen über Bücher, Zeitschriften, Schallplatten und Cassetten.

...selbstverständlich auch Speisen und Getränke.

Neue K U R S E

für Anfänger: Donnerstags 18^{30}-20^{00} Uhr; Beginn: 8.9.88

Fortgeschrittene: am Wochenende, im Drei-Wochen-Rhythmus;

Beginn: Oktober 1988

Das Haus des


Esperanto-Verein Hamburg e.V.

ist leicht zu erreichen:

Mit der U-Bahn,

Linie U3 vom Hauptbahnhof in Richtung Billstedt/Merkenstr.

zwei Stationen bis "Burgstraße".



E S P E R A N T O - V E R E I N   H A M B U R G   e.V.

Klaus-Groth-Str.95 - 2000 Hamburg 26 - Tel: 2 50 30 65

W E I T E R E   I N F O R M A T I O N E N

erhalten Sie telefonisch unter der Nr. 0 40 - 25 29 36

O D E R   bei

Deutsches Esperanto-Zentrum

Rheinweg 15

5300 Bonn 1

Telefon 02 28 - 23 58 98

HAMBURGA ESPERANTO-SOCIETO R.A.

ESPERANTO-VEREIN HAMBURG E.V.

HES—INFORMILO

Klaus-Groth-Str. 95
D-2000 Hamburg 26
Tel.: 040-250 30 65

4/88

HES-prezidanto: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, tel.: 435197
HES-konto: Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) konto n-ro 173 22-207



vidu paĝon 4!

N I A P R O G R A M O

Oktobro 1988

6-a: K.-H. Hoffmann prezentas elsendaĵon de Svisa Radio

13-a: Hans Schütt invitas - vidu paĝon 4 !

14-a T E A T R A V E S P E R O vidu paĝon 4!
ne en HES-klubejo!

20-a: Lingvaj ludoj

27-a: "Ne parolu pri politiko" diskuto

Novembro 1988

3-a: W. Kahlert prezentas diapozitivojn el la ferioj.

10-a: Babilanta Rondo

17-a: G. Roemer raportas pri biciklado tra Francio

24-a: Ni kantas

La J U N U L A R O ek de 19-a de oktobro renkontiĝas ĉiam la 1-an kaj 3-an merkredon en la monato.

19. 10.: Referat über Wohnungsbau der 20er Jahre in Hamburg (en germana lingvo)

Sukcesa jubilea tago

Tiom plena estis la domo de HES, ke ne sufiĉis la seĝoj. Okaze de la 10-jara jubileo de la propra klubejo ni invitis al informvespero. Jam ofte okazis informvesperoj - sed ĉi-foje estis io nova: Prelego kiel dua parto de la vespero. La "Büro Europaverständigung" ebligis al ni, inviti preleganton: d-ro Ulrich Lins, verkinto de la ĵus aperinta libro "La danĝera lingvo". Lia prelego ne estis resumo pri la libra enhavo, sed raporto, kiel ĝi estiĝis. D-ro Lins raportis pri la malfacilaĵoj, kiujn kaŭzis liaj klopodoj, eltrovi faktojn el la tabuigita pasinteco en diversaj landoj. La germana eldono de la verko bedaŭrinde nur pritraktas la persekuton de la Esperanto-movado sub Hitler kaj Stalin. La pli ampleksa esperantlingva eldono montras la tutan komplekson de persekutoj en multaj aliaj landoj.
Post la prelego okazis vigla diskuto kun proksimume 60 personoj, el kiuj kelkaj kontribuis al la temo el propraj spertoj dum la nazia tempo.

K U R S E

Anfänger: Donnerstags 18.30 - 20.00 Uhr
Fortgeschrittene: Im 3-Wochen-Rhythmus am Wochenende,
Beginn: 1. Oktober 1988

Anonco

Okaze de 80-jara datreveno de mia naskiĝtago la 6-an de oktobro, mi ŝatus inviti miajn Esperanto-geamikojn, ĵaŭdon la 13-an de oktobro je la 20-a al malgranda lunĉo en nian klubejon, Klaus-Groth-Straße. Mi esperas revidi multajn geamikojn.

Mi salutas vin elkore VIA Hans Schütt

T E A T R A V E S P E R O

en "Kulturladen Hamm", Moorende 29, Hamburg 26

14-a de oktobro 19-a horo

Ĉ U L A N E P O J N I N B E N O S ?

- pri la vivo post nuklea katastrofo -

laŭ "Die letzten Kinder von Schewenborn" de G. Pausewang

Aktoras: J A D W I G A G Y B C Z I N S K A (Pollando)

Post la prezentado okazos D I S K U T O
en Esperanto kaj la germana.

Temo: Kion ni povas fari? Ĉu eblas ion fari?

Partoprenantoj venos i.a. de Institut für Friedensforschung, Hamburger Forum, Evangelia Eklezio, Büro Europaverständigung, Germana-Pola Asocio, Firedensinitiative Hamm.

Semajnfina seminario pri MEDIPROTEKTADO

7-a ĝis 9-a de oktobro en Allermöhe

Gerald Roemer, Lutterothstr. 17, HH 20, Tel. 4 91 71 94



HES-INFORMILO

HAMBURGA ESPERANTO-SOCIETO R.A.
ESPERANTO-VEREIN HAMBURG E.V.

Klaus-Groth-Str. 95
D-2000 Hamburg 26
Tel.: 040-250 30 65

5/88

HES-prezidanto: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, tel.: 43 51 97
HES-konto: Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) konto n-ro 173 22-207

Bonvolu sufiĉe frue pagi vian kotizon por 1989!
Ni aldonis P A G I L O N por kotizpagoj. Oni ankaŭ povas utiligi ĝin por donacoj! Por pagoj, kiuj alvenos antaŭ la 15-a de decembro, vi ricevos K V I T A N C O N ankoraŭ en tiu ĉi jaro.

K O T I Z O J (HES + GEA)

ordinara membro	DM 85,-
familiano aŭ junulo	DM 55,-
membro sen enspezoj	DM 65,-
subtenento	DM 135,-

-----------------((*))--------((*))----------------

Ni gratulas al I D A J A S K E R , kiu fariĝos 80-jara la 20-an de Novembro 1988.



-----------------((*))--------((*))----------------

Nia fridujo en kuirejo strikas!
Bonvolu informi nin, se vi povas donaci (uzitan) fridujon.
Ni ankaŭ danke akzeptos kuirejajn kaj metiajn laborilojn.
- kaj kompreneble M O N - D O N A C O J N !

L O N G J A R A J M E M B R O J :

60 jaroj: August Weide;
40 jaroj: Anneliese Bepperling, Helga Brodthage, Hella Lanka, Gertrud Lüdde, Dr. Ingrid Seeler, Gerhard Schikorsky, Friedel Sudec;
35 jaroj: Johann Eitmann, Grete Zerbe;
30 jaroj: Thomas Bormann, Karl-Heinz Hoffmann;
20 jaroj: Elfriede Blasius, Ida Jasker;
15 jaroj: Gabriele Bernhardt;
10 jaroj: Gerhard Hein.

Titolpaĝo: Antje Eske

N I G R A T U L A S al Elsbeth Wielgus okaze de la 60-a datreveno de ŝia N A S K I Ĝ T A G O kaj dankas al ŝi pro la laboro, kiun ŝi faris dum la multaj jaroj! Sen Elsbeth Wielgus la domo de HES ne povus ekzisti!

Ni invitas ĉiujn membrojn, familianojn, kaj amikojn, festi kun ni VENDREDON, la 9-an de Decembro, 19°° h.

N I A P R O G R A M O

Novembro 1988

17-a: G. Roemer raportas pri biciklado tra Francio

24-a: Ni kantas

Decembro 1988

1-a: K L U B E J O F E R M I T A !

3-a: Z A M E N H O F F E S T O (Sabato!)
Bonvolu anonciĝi ĉe s-ino Wielgus antaŭ la 25-a de Novembro!

9-a: (vendredo!) Naskiĝtaga festo de Elsbeth Wielgus

La klubejo restas fermita dum ĵaŭdoj en decembro.

31-a: Silvestra Vespero - bv. anonciĝi sufiĉe frue!

Januaro 1989

5-a: Retrospektivo al 1988

12-a: K-H. Hoffmann: Historio de TEJO

Hamburga Esperanto-Junularo

Deutsche Esperanto-Jugend
Landesverband Hamburg

Saluton,

kun tiu-ĉi HES-informilo vi la unuan fojon ricevas informojn pri la aktivecoj de la Hamburga Esperanto-Junularo (HEJ) sur la lasta paĝo de la informilo. La junularo renkontiĝas ĉiun duan merkredon en la salonoj des HES. Gastoj ĉiam estas bonvenaj!

Se vi havas demandojn aŭ proponojn, vi povas turni vin al:
Jürgen Wulff, Papenstr. 5 b, Hamburg 76, Tel. 250 07 81

Jen niaj planoj por la resto de 1988:

30a de novembro 1988

Gerald Roemer raportas pri urboplanado en Altona/Hamburgo dum la unua duono de tiu-ĉi jarcento (en germana lingvo).

14a de decembro 1988

Diskuto pri la planoj por la venonta jaro. Temoj: jarĉefkunveno, nova estraro, ILSE (Internacia Luda Seminario) en Hamburgo 1989

ekde la 27a de decembro 1988

Ni vojaĝas al la 32a Internacia Seminario en Traben-Trarbach. Temo de la ĉi-jara IS estas: "Religioj kaj ideologioj en Eŭropo". Ĉu vi jam aliĝis? Aliĝiloj haveblas ĉe: Germa Esperanto-Centro, Rheinweg 15, 5300 Bonn 1, Tel. 0228/235 898


Hamburga Esperanto-Societo r.

Esperanto-Verein Hamburg e.V.

Wie war's in Hamburg doch vordem
Mit Textcomputer so bequem:
Denn ohne uns viel' Müh' zu machen
Kam's Informilo raus und andre Sachen:
Adreßaufkleber, Bücherei
Und auch die Mitgliederkartei.
Das alles konnten wir uns drucken -
Doch Technik hat halt ihre Mucken.
Nach dreizehn Jahren - wie man weiß -
Ist ein Computer schon ein Greis.
Wenn wir ihn jetzt noch reparieren,
Dann würden wir nur Geld verlieren.
Billiger wird's mit einem neuen -
Über Spenden würden wir uns freuen!

Wohin? Postgiro Hamburg (BLZ 200 100 20)
Konto 173 22 - 207 , Esperanto-Verein Hamburg.
Natürlich mit steuerlich absetzbarer Quittung!

!!! Nia Komputoro ne plu funkcias!!!
Ni devas aĉeti novan, kaj pro tio
donacojn de membroj kaj amikoj petas.
Donacintoj ricevos kvitancon imposte reduktigan.



Ni atendas polan ŝipon "Dar Młodzieży" sur kiu vojaĝas samideanoj. Renkontiĝo estas planita.

Hamburga Esperanto-Societo r.a.

Esperanto-Verein Hamburg e.V.

Nia programo

majo 1989

25a: Raporto pri la Germana Esperanto-Kongreso

junio 1989

1a: babilanta rondo

8a: Hella Lanka prezentas filmon kaj raportas "Kiom multe oni povas produkti el banano-plantoj" - plej novaj eltrovaĵoj.

15a: lingvaj ludoj (Bruno Lehmann)

22a: Diskuto pri la Eúropaj Elektoj

29a: Hella Lanka: Helgoland (diapozitivoj)

julio 1989

6a: –
13a: –
20a: –
27a: –

sen speciala programo
klubejo malfermita ekde 19^{00}
gastoj estas ĉiam bonvenaj!

Keglado (vendrede 20a horo)

La venontaj datoj: 9.6. - 7.7. - 4.8. - 1.9.

Interesitoj povas demandi s-inon Wielgus
Tel. 25 29 36

Hamburga Esperanto-Junularo

Deutsche Esperanto-Jugend
Landesverband Hamburg

Merkredaj Vesperoj

La junularo renkontiĝas ĉiun duan merkredon. Gastoj ĉiam estas bonvenaj. La renkontiĝo komencas je la 20a horo. Jen la venontaj datoj:

24a de majo - 7a de junio - 21a de junio - 5a de julio

Ne forgesu KISOn



Ĉu vi jam forgesis ? Ts, ts, ts... Jen por refreŝigi vian memoron la datoj pri la Luda Seminario de GEJ: 3a ĝis 9a de julio 1989 en Norderstedt. Pli detalaj informoj haveblas ĉe: Norbert Silling, Juliusstr. 8a , 2000 Hamburg, tel. 040-4395200

Kunbiciklu al la IJK

Ĉijare du karavanoj biciklos al la IJK en Kerkrade/Nederlando. Unu el Zaragoza/Hispanio kaj la dua de Trondheim/Norvegio. La dua karavano ankaŭ traveturos Norderstedt en la nordo de Hamburg je la 9a de julio (fino de la KISO). La vojplano de tie ĝis Kerkrade estas: Norderstedt (09/07) - Buchholz (10/07) - Nienburg - Damme - Nordwalde - Oberhausen - Bonn - Eschweiler - Kerkrade (16/07)

Kontaktpersono por Danlando kaj Germanio estas: Helle Eble Jacobsen Langkaervej 24, DK-2720 Vanløse

INFORMILO HAMBURG

aŭg. / sept. 1989

n-ro 4 / 89

Esperanto, Klaus-Groth-Str. 95, 2000 Hamburg 26, Tel. 250 30 65

Komuna bulteno de Hamburga Esperanto-Societo r.a. kaj Hamburga Esperanto-Junularo (Landa Ligo de Germana Esperanto-Junularo).

Redaktoro: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, Tel. 43 51 97
Konto de HES: Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) n-ro 173 22 - 207

Novaj kursoj por komencantoj


lunde ekde 18-09-1989, 18.30 h
en VHS Norderstedt, gvidos Benno Klehr.

merkrede ekde 20-09-1989, 18.00 h
en la HES-klubejo, gvidos Hella Lanka.

Informvespero

14-09-1989, 19.00 h en la HES-klubejo

Por interesitoj ni donas enkondukajn informojn pri Esperanto kun provleciono kiun faros Hella Lanka. La gazetaro estas informita kaj ni espereble povos akcepti multajn gastojn. Bonvolu informi viajn konatojn pri tiu grava dato. Por ke niaj gastoj ne suferu de malsato, ni petas vin kunporti manĝaĵojn kiel salatoj, frikadeloj kaj bakaĵoj. Ni antaŭdankas al vi!



VHS Norderstedt:
Tago de la malfermita pordo

Kadre de la inaŭguro de la kulturdomo en Norderstedt la popol-altlernejo organizas tagon de la malfermita pordo je la 2a de septembro. Ekde tiu dato la VHS Norderstedt havos la novajn salonojn kaj oficejon en la kulturdomo. Dum tiu tago troviĝos informtablo pri Esperanto en la pasejo inter la urbodomo al la kulturdomo de la 10a ĝis la 18a horo. Je la 11a horo okazos "Schnupperstunde" (provleciono) de Esperanto por varbi parteprenantojn por la komencanta kurso kiu komenciĝos je la 18a de septembro.

Biblioteko de HES

Nia nova bibliotekistino Delia Pick petas, redoni aŭ resendi la forprenitajn kaj eble forgesitajn librojn. En la HES-biblioteko mankas multaj valoraj libroj kiuj ne plu estas akireblaj. Bedaŭrinde ne ĉiuj enskribiĝis en la libron de prunteprenoj. Do ni petas ĉiujn membrojn rigardi siajn libroŝrankojn, ĉu eble ankoraŭ enestas libroj de HES.

Nun estas la tempo por redoni librojn aŭ donaci ne plu bezonatajn librojn al la klubo ĉar ni finfine volas reorganizi la biliotekon.

Ni dankas

al ĉiuj donacintoj, kiuj konsentis aĉeti novan komputoron. Speciale ni dankas al s-rino X kaj s-ro Y pro la grandaj sumoj de po 300 markoj.

Hamburga Esperanto-Societo r.a.

Esperanto-Verein Hamburg e.V.

Nia programo

aŭgusto 1989

3a sen speciala programo
10a unuaj kongresraportoj
17a novaĵoj el Grésillon
24a vojaĝintoj raportas
31a preparoj por la sabata inaŭguro de VHS Norderstedt

septembro 1989

7a lingvaj ludoj
14a informvespero (ekde la 19a horo)
21a Babilanta Rondo
28a Hella - diapozitivoj pri la jubilea velŝipa renkontiĝo

oktobro 1989

...
12a Hans Schütt invitas al vespermanĝo por komune festi lian naskiĝtagon.

Klubvesperoj ĉiam ĵaŭde ekde 19⁰⁰ h
programo 20⁰⁰ h
gastoj estas bonvenaj!

Hamburga
Esperanto
Junularo

Deutsche Esperanto-Jugend
Landesverband Hamburg

Kia koincido

Kia Koincido, la teatra grupo de Germana Esperanto Junularo prezentos sian novan teatraĵon dum la kongresoj en Kerkrade kaj Brighton. Estas "Kato sur varma ladotegmento" de Tennessee Williams (tradukis Ian Jackson). Tri hamburganoj ludas en la grupo kaj en la lastaj monatoj la grupo jam plurfoje provludis en Hamburg.

Kunlaborantoj serĉataj

Sur la 2a paĝo vi legis pri la inaŭguro de la VHS Norderstedt. La informtablon kunorganizos la Hamburga Esperanto-Junularo. Do se vi havas tempon je la 2a de septembro kaj emas kunlabori demandu dum la sekvantaj vesperaj renkontiĝoj pri detaloj.

Merkredaj vesperoj



2a de aŭgusto	raportoj pri Kerkrade
16a de aŭgusto	raportoj pri Brighton
30a de aŭgusto	preparo de la VHS-inaŭguro en Norderstedt
13a de septembro	preparo de la HES-informvespero
27 a de septembro	renkontiĝo kun la kursanoj de la nova komencanta kurso de HES



Hamburga Esperanto-Societo r.a.

Esperanto-Verein Hamburg e.V.
im Landesverband Hamburg des Deutschen Esperanto-Bundes

Esperanto-Verein Hamburg e.V. - Klaus-Groth-Str. 95 - 2000 Hamburg 26

Klaus-Groth-Str. 95
2000 Hamburg 26
Tel: 250 30 65

Es ist soweit !

Am 20. September 1989
beginnt der neue
Esperanto-Kurs für Anfänger

1 x wöchentlich
Mittwoch 18.00 h - 19.30 h

Anmeldung unter 250 30 65
oder 25 29 36

oder am Info-Abend
am 14. September 1989, 19.00 h
im Esperanto-Haus

Die Adresse für
Esperanto in Hamburg:

Esperanto
Klaus-Groth-Str. 95

INFORMILO HAMBURG

okt. - dec. 1989

n-ro 5 / 89

Esperanto, Klaus-Groth-Str. 95, 2000 Hamburg 26, Tel. 250 30 65
Komuna bulteno de Hamburga Esperanto-Societo r.a. kaj Hamburga Esperanto-Junularo (Landa Ligo de Germana Esperanto-Junularo).
Redaktoro: Benno Klehr, Oelkersallee 31, 2000 Hamburg 50, Tel. 43 51 97
Konto de HES: Poŝtĝiro Hamburg (BLZ 200 100 20) n-ro 173 22 - 207

33a Internacia Seminario
de Germana Esperanto-Junularo

Informoj ĉe: Deutsche Esperanto-Jugend
Rheinweg 15
5300 Bonn 1

IS

Temo:
Sovetunio

Ambaŭ aranĝoj 27.12.-3.1.

IF

Temo:
Infanoj en Eŭropo

6a Internacia Festivalo por mezaĝuloj 25 - 50-jaraj

Informoj ĉe: Hans-Dieter Platz
Maikammerer Str. 21
6731 St. Martin

Novaj kursoj por komencantoj

Sub lerta gvido de Hella Lanka komenciĝis kurso kun 7 gelernantoj, kiu regule okazas merkrede vespere en la klubejo.
Spite al ĉiuj Bombinatoraj Vokoj ĝi funkcias bone.
Alia kurso, en VHS Norderstedt, ne povis komenciĝi ĉar nur ĉeestis 6 partoprenantoj, kaj en kurso de VHS (popol-altlernejo) devas esti minimume 10.
Do la kurso translokiĝis de VHS al DGB.(sindikato)
Tie nun okazas la kurso sub gvido de Benno Klehr.

Studrondo

Antaŭ kelkaj semajnoj el la progresinta kurso formiĝis studrondo.
La celo estas plibonigi nian lingvo-scion.
Ĉar ni ne havas instruiston, ni tre ĝojus, se bone parolantaj Esperantistoj venus iam aŭ tiam por helpi al ni. Ni bezonas vin!
Ni renkontiĝas ĉiun duan semajnon, sabate de la 14a ĝis la 17a horoj.
Nia venonta renkontiĝo okazos la 21an de oktobro.

La partoprenantoj
(B. D. G. H. J. W. ktp)

Überweisungsauftrag/Zahlschein-Kassenbeleg

(Name und Sitz des beauftragten Kreditinstituts/Postgiroamts) (Bankleitzahl)

Empfänger: Esperanto-Verein Hamburg e.V.
Bankleitzahl: 200 100 20

Konto-Nr. des Empfängers: 173 22-207 beim Postgiroamt: Hamburg

Verwendungszweck (nur für Empfänger)

Ne forgesu vian kotizon 1990!
La kasistino dankas.

DM ***** 85,00

Konto-Nr. des Auftraggebers — Auftraggeber/Einzahler

NIA PROGRAMO

Oktobro 1989

5a: Bildoj pri Brajtono de W. Kahlert
12a: Festo de H. Schütt
19a: Raporto pri San Marino de ges-roj Bormann
26a: Lingvaj ludoj de Bruno Lehmann

Novembro 1989

2a: El Svisa Radio prezentas K.-H. Hoffmann
9a: Bildoj el Francio de W. Löbel
16a: diskuta vespero
23a: Libroj el nia biblioteko (Delia Pick)
30a: Klubejo fermita pro sabata festo

Decembro 1989

2a: ZAMENHOFFESTO
- Bonvolu anonciĝi ĉe s-ino Wielgus -
7a: Lingvaj ludoj de B. Klehr
14a:
21a: } Klubejo fermita pro ferioj
28a:

Januaro 1990

4a: Raporto pri la Internacia Seminario
11a: Babilanta Rondo

Ni deziras al ĉiuj membroj kaj amikoj agrablajn festotagojn kaj bonan novan jaron!

via HES

Hamburga
Esperanto-
Junularo

Deutsche Esperanto-Jugend
Landesverband Hamburg

Der GEJ-Landesverband Hamburg lädt ein zu einem

Wochenendseminar "Gesundheit"

vom 27.-29. Oktober 1989

Das Thema soll von verschiedenen Seiten und vor allem sehr praktisch behandelt werden. Die gesundheitliche Vorsorge wird intensivst vor allem im Bereich Ernährung betrieben: Wir kochen Vollwertkost - selbst. Nach den Mahlzeiten wird eine Krankengymnastin versuchen, uns durch Übungen wieder auf die Beine zu bringen. Spaziergänge am hafenrand (wo sich u.a. das berühmte Hafenkrankenhaus befindet) dienen dem Augentraining und der Durchblutung des Körpers. Durch intensivstes Esperantosprechen werden die Gehirnwindungen massiert und das Lustzentrum aktiviert. Denn - nben ein wenig Theorie, die ebenfalls geboten wird - gilt das Motto: SPASS HÄLT FIT !

Ort: Esperanto-Klubhaus Hamburg, Klaus-Groth-Str. 95, 2000 Hamburg 65
(mit U-Bahn-Linie U3 zwei Stationen vom Hauptbahnhof bis "Burgstaße",
von dort sind es ca. 3 Minuten; ein Umgebungsplan hängt in der Haltestelle)
Telefon 040-250 30 65

Zeit: Freitag 27.10. ab 18.00 Uhr bis Sonntag 29.10. nachmittags

Unterbringung: Im Klubhaus, bitte Schlafsack und evtl. Luftmatratze mitbringen

Kosten: 30 DM

Anmeldung bei Jürgen Wulff, Papenstr. 5 B, 2000 Hamburg 76
Telefon 040-250 0781 oder 040-491 71 94

Merkredaj vesperoj

La venontaj datoj estas

11a de oktobro - 25a de oktbro
8a de novembro - 22a de novembro

Ni renkontiĝas en la klubejo de HES, Klaus-Groth-Str. 95, Hamburgo
ekde la 20a horo.